

Mia Esperantisteco

Mi estis 15-jara, kiam mi eniris posttagmeze en la bibliotekon de la Franciskana Seminario de Rionegro, Paranaa municipo kaj urbo de Brazilo, certe la centan fojon, ĉar mi estis muso de biblioteko, kaj haltis antaŭ etaĝero en kaŝita loko. Tie mi etendis la manon, kaj kaptis libreton, kiu kaptis min por la resto de mia vivo:

BEHRENDT, Arnold. Die Esperantosprache. Breslau: memeldono, 1912. 14 p.

Multaj el miaj kunseminarianoj estis germandevenaj, kaj ne unuafoje germanis en siaj balbutoj. Mi do pro tio komprenis, ke la titolo temis pri la lingvo Esperanto. Jam en tiu tempo mi lernis kelkajn lingvojn, precipe la francan, la latinan kaj la grekan, kaj sciis pri multaj aliaj, sed neniom pri tiu Esperanto. Restis al mi nur iri al la unua trovita pastro, ĉar ĉiu el ili estis por mi sinonimoj de la sciopleneco:

- Pastro Tadeo, kio estas la lingvo Esperanto?
- Lingvo de la tuta mondo.
- Kie ĝi estas parolata?
- En la tuta mondo...
- Ĉu vi parolas ĝin?!
- Frato Rejnaldo parolas.

La respondoj estis tiel mallongaj kaj miaj scideziroj estis tiel longaj, ke mi pensis, ke pli bone estas iri al la libro kaj demandi de ĝi la konojn, kiuj nur gutis el Frato Tadeo. La unua paĝo estis la unua baro: la germana lingvo. Tio tamen estis nur momenta problemo, ĉar alia seminariano parolis la platgermanan ĉe sia familio, kaj li bonvolis studi kun mi. De tiu tago li kaj mi ofte troviĝis kune, sed tio kostis al ni iom da konsiloj, ĉar la rigidaj reguloj postulis trion, malofte duon kaj neniam unuon:

Neniam unu.

Malofte du.

Ĉiam tri.

Tiun trian ni neniam trovis, sed akcidento transformis la duopon en unuopon. Efektive, unu vesperon (ni havis kelkajn liberajn minutojn dum la vespero, post la manĝo) mia kolego diris al mi alarmite:

- Ni iru konfesi nin, ĉar ĉi tiu estas malpermesata libro, peka...

Kaj konsternitaj, ni iris al unu el la fratoj, cetere tiu sama, kiu klarigetis al mi, kio estas Esperanto:

- Ni devas konfesi, ke ni legis ĝis nun kelkajn paĝojn de ĉi tiu libro, kiu estas nebona.

Ĝi parolas pri nedecaj aferoj: publikulinoj... pekaj virinoj!

- Kaj kie vi trovis ĝin?
- En nia biblioteko...

Frato Tadeo ekridis:

- Nekredeble.

Kaj ni remetis:

- Kredeble. Jen.

Kaj ni malfermis la libron. La manoj iom tremis pro la malvarmeco de la peko kaj la timo al la varmeco de la infero, se li kaj mi insistus kaj persistus en tia malmorala libreto:

- La leciono komenciĝas pere de vortareto, kaj tie estas skribite tute klare:

Fraŭlino: Fräulein [frojlajn] .

La pastro certe ne komprenis la germanan, kvankam li estis germano el Germanujo... Tio estis absolute certa por ni, ĉar li tuj rediris al ni:

- Mi vidas tie nenion malsanktan...

Kaj nun ni restis subite senparolaj, senkredaj, senagaj, efektive tute ĉiosenaj... Kiel povas esti, ke pastro ne scias, kion signifas la vorto *Fräulein*? Ĉu li estas tiel senkulpa kaj senpeka, ke li ne konas la famon... de tiuj virinoj?!... Mia kolego iom balbutis la klarigon, la vangon tute ruĝa kaj la korpon tute trema, la voĉon tute basa kaj la tekston tute duobligita silabon post silabo, sed tion mia afabla leganto nur imagu mem por eviti al si mem langotordon (mi suferas de memeco!):

- Frato Tadeo, Fräulein estas putino!...

Kaj mia paciencema legulo (mi esperas havi legulojn, ne nur legantojn) permesu al mi la sekvantan interparentezan digresion, kaj bonkore bonvolu (mi suferas de boneco!) iri al la fina propozicio de la antaŭlasta alineo: ... *sed tion mia afabla leganto nur imagu mem por eviti al si mem langotordon*. Mi estas stulta kaj senatenta, pli da unua ol da dua... Se mi ripetis la legitan kaj komentotan propozicion, kial pro la diablo mi sendis mian sentempan legiston (ho se mi havus tiajn!) al la fino de la antaŭlasta alineo?!... Mi tamen ne tro etendu ĉi tian ekstertemaĵon. En tiu benita propozicio (tiu *benita* estas certe brazilanismo), aperas la vorto *leganto*, kiun multaj el niaj parolantoj ŝanĝus al *legonto*, ĉar ili pensu per verboformo, ne per participo: ... *sed tion tiu, kiu afable min legos, nur imagu mem por eviti al si mem langotordon*. Lamentinde, legonto neniam povas imagi al si ion estantan en estonta legado... ĉar ĝin li ne legis! En la fino, ĉiu loĝanto de nia tuta mondo estas unu el la eblaj legontoj... sed tion ni scikonos nur en la momento, kiam ili eklegos, pli malkabe¹: kiam ili estos eklegintaj!

Mi forte esperas, ke ĉiu havu en la manoj la fadenon de Ariadna por konstati, ke nun mi reiras al mi historio...

Pastro Tadeo, pastrigonta kaj panfaranta laboristo en sia juneco, li nun vere eksplodis per ridego. Klara ridado, kiu informis nin, ke li freneziĝis pro la konscio de nia peko, kaj eĉ ne povis facile absolvi nin... Kiam la ridego estingiĝis, kiel kandelo post viva ventoveno, li komprenigis al ni nian lingvan konfuzon:

- Ho ve al vi, vermuloj.

Ĉar ni interparolis portugallingve, li ja ne alsakris nin per tiu lasta vorto, sed nun mi rekreas tian situacion havitan en koridoro de la Seminario, kaj pensas pri ĝi verde ĝuste pro tio, ke tiu lasta vorto bone vidigas nian tiaman perpleksecon: vermulo estas stranga duoblaĵo, en kiu loĝas ulo de vermo kaj mulo de la vero...

Li plu gestis kaj sin manifestis sen atento pri mia nuna digresio:

- Fräulein estas nur virino, kiu ne edziniĝis.

Ni restis mutaj kaj brutaj.

Post tiu incidento, mi restis unuopo dum tre mallonga tempo. Efektive, nelge (simpla mallongigo de la vorto *nelonge*) poste, la duopo restariĝis:

Gersi Alfredo Bays miraklis en mia vivo. Fakte, miraktis.

En tiu tempo, eble nur post kelka ioma tempo, okazis mia unua disrevigo pro alies diro kaj egale mia unua disreviĝo pro mies aŭdo. Mi jam sufiĉe malbone parolis tiam Esperanton, kaj mi memoris la informon de frato Tadeo pri Frato Rejnaldo, ke li parolas Esperanton. Mi do aliris al li per demando, kiun mi zorge formulis (Ho, mia Zamĉjo! denove for mulo...) en mia menso:

- Ĉu vi parolas la lingvon Esperanto?

¹ Kabe, nia plej fama stilisto, abomenis tiajn kunmetitajn verboformojn.

Kaj mi ĵuras, ke mi metis la vorton *lingvo* en akuzativon kaj la vorton *Esperanto* en nominativon, sed tion mi ŝuldis al la latina lingvo, en kiu mi respondis al la tri demandoj de la trioblaj ĉiujaraj ekzamenoj de la studobjekto pri religio. Eĉ en la latina, mi emis al nekutimaj vortoj: mi neniam uzadis la vorton *momentum*, *momenti*, sed nur la poezian kaj altsonoran *momen*, *mominis*... por la granda konsterno de Frato Tadeo, kiu riproĉis min ĉiufoje:

- Kian difcilan lingvon vi skribas...

Kaj mi prenis la vorton *difcila* nur por pardonigi al mi mian tiaman disreŝigon, kaj eble pro tio, ke nun mi juĝas tiun uzitan vorton vere bona, ĉar ĝi estas difacila! Ho mia Zamĉjo, mi perdis min sur la vojo de mia rakonto – nen: de mia rakonto! – finfine, mi jam komencis ĝin kaj ĝin ne finis [bona kvinjambo, portugallingve deksilaba verso: *mi jam komencis ĝin kaj ĝin ne finis*], sekve ...-anto, ne ...-onto. Mi do nun deturnu min de la devia vojo, ĉar ne mia, se de via, kaj revenu al la nova bojo. Frato Rejnaldo estis sur la sama loko en la sama koridoro, kiu dekretis la finon de la unua duopo, kaj eĉ ne haltigis sian iradon al la proksima futbala kampo. Li nur sputis:

- Poke.

Tia vorto, mi ĝis tiam ne estis vidinta ĝin [mi ĵus praktikis kaj pleonasmon kaj anakoluton, kaj la kvar lastaj vortoj estas deksilaba prozaĉa verso...]: mi konis nur la antonimon *malmulte*. En tiu tempo mi ĉion ignoris pri la kaloĉaja kaj varingjena poezia terminaro, kaj mi mem enmetis en miajn unuajn poeziaĵojn kelkajn ne ekzistantajn en Esperanto vortojn (kaj jen mi misgermanigis mian ordinare latinecan verdan stilon, vere misgermanigo, ĉar la vera germanigo verŝajne postulus alian vorttordon: kelkajn en Esperanto ne ekzistantajn vortojn). De tiam la vorto *poka* estas unu el miaj malmultaj (ne malmultaj, sed ja mem malmultaj) naŭzaĵoj, por kiu miaj oreloj kaj mia gorĝo obstrukciĝas...

Kiam mi forlasis la urbon Rionegro, kaj translokiĝis al alia, sed egale franciskana Seminario, tiam trafis nin la vizito de nekonato, kiu volis koni nian novan Seminarion en Agudo, urbo de la Ŝtato Sankt-Paŭlo. Tute hazarde, kaj certe tute malhazarde, ĉar fataldestine, en nia konversado aperis aludo al Esperanto, kaj li estis mem esperantisto! Laŭro li estis, kaj lia ĉeesto malfermis por mi la vastan vojon al Esperanto per la simpla indiko de la adreso de Ismael Gomes Braga, ĝis nun memorata de mi: Rua Ramon Franco, 64 – Urca, Rio de Janeiro RJ.

Kaj pardonu min, sed venas alia digresio priteksta. Post la nomo de Iŝmael (tian skribon li preferis en siaj verdaj laboroj!), mi skribis unue: ... *kiun ĝis nun mi ne forgesis*. Tion tamen mi sentis ambigua kaj polisemia, vere nur dusemia: 1. Mi ne forgesis ĝin. 2. Mi ne forgesis lin. Mi do forviŝis tian dusencecon kaj enskribis alian: ... *ĝis nun memorata de mi*. Kaj efektive mi enskribis alian dusencecon, kiun nur nelge² mi rekonis. Miaj kunlegantoj bonvolu do restarigi la unusencecon per la sekvanta substituota varianto: ... *kies figuron kaj adreson mi neniam forgesis*.

En tiu sama tago mi skribis leteron al S-ro Iŝmael, kaj post kelka hezito enmetis unu el miaj lastaj poeziaĵoj, en kiuj svarmas multaj esperantigitaj portugalaj vortoj: mi havis pli da ideoj ol da verdaj vortoj... La respondo venis akurate kun laŭdoj kaj mallaŭdoj, sed mi mensogas: ne mallaŭdoj, sed korektoj! Kompreneble, la leteron mi ricevis malfermita, ĉar la malfermo de pakoj kaj leteroj estis tradicio seminaria por evito de estontaj pekoj per

² *Antaŭ nelonge*, nun jam vortarita. Unua spuro: en la unua eldono de Parnasa Gvidlibro, de K. Kalocsay, G. Waringhien kaj R. Bernard. Dua spuro en la dua eldono, p. 157: Varsovio: Pola Esperanto-Asocio en kunlaboro kun "Heroldo de Esperanto", 1968. 160 p. Tria spuro, p. 779: La Nova Ilustrita Vortaro de Esperanto. Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda, 2002. 1265 p.

estontaj volovekoj. Lian leteron mi legis vekita kaj dormanta, ĉar mi ĝin lasis sub mia kapkuseno. Kaj skribis alian. Kaj venis alia respondo akurata. Malfermita koverto. Kaj mi ĝin legis vekita kaj dormanta. Kaj skribis alian. Kaj venis respondo akurata. Fermita koverto. Kial malfermi la koverton, se Frato Rejnaldo restis en Rionegro, kaj nur Frato Tadeo venis kun ni al Agudo? Tio estis mia unua materia ĝojo per Esperanto: ricevi de la pastroj ne kontrolitan leteron.

Frato Tadeo estis sanktulo. Du pruvojn mi havas pri tio. En unu el mia vizito al lia studoĉambro, mi vidis, ke li skribas per duonrompita plumo, kiu lasas terurajn strekojn kaj malstrekojn sur la linio. Mi do demandis lin:

- Frato Tadeo, kial vi ne prenas alian plumon?

Li respondis plene kaj solene:

- Geraldo, mi votis obeemon, ĉastecon kaj malriĉecon. Pro tiu tria, mi ne petas de mia superulo alian plumon. Li ĝin donos al mi, kiam li vidos, kian kakografion mi skribas...

La tagmanĝo kaj la vespermanĝo ĉe la Seminario estis ĉiam vastaj kaj balastaj kaj tute ne fastaj eĉ en vendredoj kaj en tagoj de la Sankta Semajno: ni estis junaj, kaj ni devis bone disvolviĝi... Estis foje tamen sako da fazeolo, kiu estis aĉetita sen testo kaj atesto: vermita. Dum tuta semajno, neniu el la seminarianoj prenis el la poto ian porcion da fazeolo, sed restis kontentaj pri la rizo, la makaronio, la viando, la terpomo kaj la salato. Sed ne li, Frato Tadeo... Serenmiene, li prenis la kvanton de ĉiu alia tago, miksis ĝin kun rizo. Kaj manĝis!...

Ekzemplodona sanktulo!

Mia interleterado kun Iŝmael daŭris tri jarojn: venis leteroj kaj venis pakoj, venis konsiloj kaj konsoloj, venis prelegoj kaj prologoj, kaj mi kulpas min, ke ĉio estas perdita de mia preteratento. En unu el liaj leteroj estis tamen ordono, kiun mi malobeis. Mi verkis la poemon *La Orfo*, por kiu mi adaptis la strukturon de la novelo *La Milda Miraklo*, de José Maria de EÇA DE QUERÓS (1845-1900), kaj tiu de la poemo *La Larmo*, de Abílio Manuel GUERRA JUNQUEIRO (1850-1923), ambaŭ bonegaj kaj ĝis nun legataj verkistoj³ de la portugala literaturo. Leginte mian poemon, Iŝmael konsilis min per la sekvantaj vortoj:

- Geraldo, rompu vian plumon, ĉar neniam plu vi verkos ion pli bonan kaj pli belan.

Mi ne rompis, kaj plu verkis, kaj neniam mi kuraĝis aperi tiun poemon en unu el miaj pluraj verdaj libroj. Gersi maltimis en unu el la fontoj de FONTO.

En la fino de la tria jaro en Agudo (1950-1952), mi estis aprobata en la lasta jaro de la kolegia kurso, kaj decidis iri for de la Seminario kaj ne pastrigi, sed patriĝi (ne unua motivo). Verŝajne pusxis min for mia unua poemeto en Esperanto, kiu estis simpla aranĝo de miaj unuaj lernitaj vortoj:

Ci
Kaj
Mi.

³ La unua estas eksterordinara romanisto, kies sola difekto konsistas en tio, ke li verkis portugallingve. Li estis sufiĉe ksenofobia por diri: Alilandan lingvon ni devas paroli fiere malbone. Li tamen parolis la francan perfekte... La dua estas konata per sia feroca antiklerikalismo, sed liaj poemoj estas superbelaj kaj superemociaj. Kaj venis nun al mi en la kapon la ideo publikigi la tradukon de la du cititaj verketoj krom mia *La Orfo* por paroli pri tekstostrukturo (ho kiom toa langorompa vorto: kvinjambo kaj deksilabo!). Ĉu vi ĝin publikigos, Gersi?

Mi
Kun
Ci.

Ni
Kaj
Nun:

Ni
Kun
Gaj? ...

Plej verŝajne, tiu poemeteto havas nenion komunan kun mia posta retiriĝo, kaj tiu dua persono estus nur la amo al Dio... Restas tamen la fakto, ke mi forlasis unu matenon mian dekjaran hejmon (1943-1952) en tri seminarioj franciskanaj, feris dum semajno, kaj alvenis poste frumatene al Rio de Janeiro, el kiu mi devis iri al mia familio en apuda domourbeto - tiam kaj nun ne tiom dormourbo: la sepa plej riĉa en Brazilo. Ili ne atendis min, miaj familianoj, ĉar mi informis nur, ke mi foriras, kaj vojaĝas kun amiko sur la plaĝon por semajna ripozo en la grava havenurbo Santo, de Ŝtato Sankt-Paŭlo. Alia interkrampa teksto: se la portugala Atenas kaj Marrocos estas la verdaj Ateno kaj Maroko, evidente la portugala Agudos kaj Santos devas esti Agudo kaj Santo. Efetive, tien mi vojaĝis kun Laŭro, la unua homo, kiu parolis al mi pri Esperanto, sed ne en Esperanto. Li havis domon kun puto el sulfura akvo, kiu rapide forigis la veziketojn, kiujn li havis sur la vango pro la ĉiutaga razado, kaj mi ĝin gustumis (la sulfuran akvon, ne la razadon) samtempe la unuan kaj la lastan fojon... kiel ĉiu kuracilo malbongusta kaj eĉ naŭza. El tie fine Rion.

Spite de la frua horo, la stacidomo estis plena – jam en tiu epoko Rio estis plurmiliona urbo! – kaj mi direktis min al mia buso, kiam subita penso invadis mian kapon:

- Kial ne iri al Iŝmael? Li ja jam vekiĝis, ĉar la karioka varmo delogas la kariokojn de la lito sufiĉe frue... Mi do tien!

Tramo portis min al Urka, la kvartalo, en kiu li loĝas. Alveninte, mi rigardis al la duetaĝa domo, kaj vidis ĝin tute lumigita: almenaŭ li estos vekita, kiam mi frapos ĉe lia pordo! Post ioma sendecideco, mi transiris la Rubikonon sen scii, ke mi ĝin transiris: mi frapis ĉe li... per premeto rapida kaj senavida.

Li ŝajne staris post la pordo atende al mia frapeto: la pordo malfermiĝis. Kaj mi vidis mezaltan homon en la paso de la sesdekaj kun bela kaj longa hararo tute nekutima en tiuj rigidaj jaroj, en kiuj longaj haroj akordis nur kun virinoj. Kaj dum mi spektis al li, li prenis kombilon kaj kombis siajn longajn nigrajn harojn. Mi tiam rekonsciiĝis, kaj diris al li kun tremanta voĉo:

- Mi estas Geraldo Mattos. Ni...

Mi volis aldoni, ke ni korespondis dum la lastaj tri jaroj, sed ne estis tempo por tio, ĉar li brakumis min kiel patro brakumus filon post longa forestado. Kaj kondukis min supren laŭ ligna kurba ŝtuparo al sia skriboĉambro. Li parolis, kaj mi respondis. Mi parolis, kaj li respondis. Kaj la tempo pasis. Mi do diris al li:

- Pardonu min, sed nun mi devas danki vin por viaj leteroj kaj por via amika akcepto. Mi iras nun al la miaj.

Li ridis, kaj neis:

- Ne. Vi matenmanĝos kun mi.

Ni desupris, trapasis ĉambreton, kaj eniris en la antaŭkuirejon, kie li interpretis sian edzinon kaj min. La matenmanĝo komenciĝis, daŭriĝis kaj finiĝis. Kaj ni alsupris al lia skriboĉambro. Tri horojn poste, mi diris al li:

- Pardonu min, sed nun mi devas denove danki vin por viaj leteroj, por via amika akcepto kaj por via bongusta matenmanĝo. Mi iras nun al la miaj.

Li ridis, kaj neis:

- Ne. Vi tagmanĝos kun mi.

Post kelkaj minutoj, ni desupris, trapasis ĉambreton, kaj eniris en la antaŭkuirejon, kie jam estis lia edzino kaj staranta servistino. La tagmanĝo komenciĝis, daŭriĝis kaj finiĝis. Kaj ni alsupris al lia skriboĉambro. Kvar horojn poste, mi diris al li:

- Pardonu min, sed nun mi deeevas denoove danki vin por viaj leteroj, por via amika akcepto, por via bongusta matenmanĝo kaj por via multmanĝiga tagmanĝo. Mi iras nun al la miaj.

Li ridis, kaj neis:

- Ne. Vi lunĉos kun mi.

Post kelkaj minutoj, ni desupris, trapasis ĉambreton, kaj eniris en la antaŭkuirejon, kie jam estis lia edzino kaj staranta servistino. La lunĉo komenciĝis, daŭriĝis kaj finiĝis. Kaj ni alsupris al lia skriboĉambro. Tri horojn poste, mi diris al li:

- Pardonu min, sed nun mi deeevas denooove danki vin por viaj leteroj, por via amika akcepto, por via bongusta matenmanĝo, por via multmanĝiga tagmanĝo kaj por via apetitiga lunĉo. Mi iras nun al la miaj.

Li ridis, kaj neis:

- Ne. Vi noktomanĝos kun mi.

Post kelkaj minutoj, ni desupris, trapasis ĉambreton, kaj eniris en la antaŭkuirejon, kie jam estis lia edzino kaj staranta servistino. La noktomanĝo komenciĝis, daŭriĝis kaj finiĝis. Kaj ni alsupris al lia skriboĉambro. Du horojn poste, mi diris al li:

- Pardonu min, sed nun mi deeevas denooooove danki vin por viaj leteroj, por via amika akcepto, por via bongusta matenmanĝo, por via multmanĝiga tagmanĝo, por via apetitiga lunĉo kaj por via realtabliĝema noktomanĝo. Mi iras nun al la miaj.

Li ridis, kaj neis:

- Ne. Vi de nun loĝos kun mi.

Kaj li difinis por mi ĉambron, en kiu mi dormis, kaj songis pri paradizo.

La sekvantan matenon, mi adiaŭis lin kaj lian edzinon, kaj promesis reveni du tagojn poste. Mia sola valizo jam restis ĉe li, krom kelkaj vestaĵoj portataj por du tagoj.

Kiam mi revenis du tagojn poste en la komenco de la mateno, li transdonis al mi sian unuan donacon en sia domo: monujon kun sufiĉe da mono por du monatoj... Kaj ĉe li kaj lia edzino mi restis dum dek kvin monatoj, ĝis mi edziĝis al la esperantistino Daisy Angelina kontraŭ la volo de Iŝmael, kiu longe skribis al ŝi, kaj nur post la sendo de la letero legis ĝin al mi. Resume, li diris, ke mi estas poeto, havos multajn virinojn, kaj do estos malbona edzo.

Li pravis.

Ŝi tamen donis al mi kvar magiajn infanojn: Ludovikon (neniu povas imagi, kial tia estis la nomo de mia unua filo), Frederikon, Rikardon kaj Karlan. Mia unua intenco estis nomi ŝin Klara (neniu esperantisto divenas, kial...), sed ŝi venis bruna, kaj mi do nur interŝanĝis la mezajn literojn... Pro tiu unua nomo donita al mia plej aĝa filo, mi nun estas patro de kvar ko-filoj kaj avo de sep ko-nepoj. Krome, ĉar nun mi estas jam antaŭpatro, la

komenco de marto vidos mian kvinan ko-infanon, kiun mi esperas ko-filino... [Viktor estas tiu mia kvina ko-filo: 19.02.2004]...

En la domo de Iŝmael mi faris miajn elementajn studojn de Esperanto sub lia aminda kontrolo kaj sub la severa regado de Porto Carreiro Neto, kiu apartenis al la grupo de la plenaj konantoj de la stilo de Zamenhof. Ĉar li vidis, ke mi jam bone parolas kaj skribas en Esperanto, li konsilis al mi iri al BEL - Brazila Esperanto-Ligo - por submetiĝi al la ekzamenoj. Mi iris tien kaj en unu sama tago de 1953 mi estis aprobata en la elementa, en la supera kaj en la magistra ekzameno. La tiama Preezidanto de BEL, Carlos Domingues, unua brazilano en la Akademio de Esperanto, subskribis miajn atestojn kaj varme gratulis min, ĉar mi estis la unua, kiu faris ĉion unutage. Mi aldonu, ke mi studis por tiaj ekzamenoj dum pluraj monatoj...

La domo de Iŝmael verkigis al mi miajn du unuajn librojn: *La tento de la junulo* kaj *Ivan VI*, ambaŭ de 1953. Kaj restis interrompita kaj nun perdita mia dua tragedio pri unu el la brazilaj flagistoj⁴, kiun Porto Carreiro Neto proklamis pornografia...

Kaj mi devas fini per mia dua malobeo al Iŝmael. Dum nia trijara leterado, la temo pri religio ne estis tuŝita, sed mi tuj sciigis, jam en la unua semajno, ke li estis spiritisto. Multaj el la libroj pri Spiritismo, precipe la fundamentaj sub la plumo de Allan Kardec, estis jam tradukitaj en Esperanton, kaj mi legis ilin atente ne nur kiel religiajn librojn, sed ankaŭ kiel modelojn de bela kaj bona lingvo, ĉar tradukitaj de Porto Carreiro Neto kaj de Ismael Gomes Braga. En la fino de la jaro, mi apostatis, kaj fariĝis spiritisto pro la libroj kaj pro la ekzemplo pri boneco, kiun donis al mi Iŝmael. Kiam mi tion komunikis al li, li energie penis deteni min de mia decido:

- Ne faru tion, Geraldo. Spiritismo jam havas por si multe da fervoraj propagandistoj, sed ne Esperanto: restu nur kun Esperanto. Por tio vi naskiĝis, kaj tio estas via tasko en via nuna vivo sur la tero!

Mi fariĝis spiritisto, sed ne okupiĝis pri religiaj aspektoj. Aroganta kiel multaj junuloj, mi skribis al Frato Tadeo mallongan leteron, kiu respondis al mi egale mallonge:

Agudo, Kristnaskon de 1953

Mia bona Geraldo:

Vi estas azeno.

Pacon kaj bonon,

Frato Tadeo

En la 13-a de Marto 1954, Daisy Angelina Carnasciali kaj Geraldo Mattos Gomes dos Santos geedziĝis, kaj iom poste ni translokiĝis al Kuritibo, kie loĝis ŝiaj gepatroj: ŝi tiam trapasis malfacilan gravedecon. Kaj en la dimanĉo de la brazila karnavalo naskiĝis la sekvantan jaron Ludoviko Carnasciali dos Santos, mia unua filo, nun doktoro pri Lingvistiko per tezo pri la indiĝena Sujaa lingvo kaj direktoro de la Sektoro pri Homaj Sciencoj en la Londrina Sxtata Universitato de Paranao.

⁴ Bandejranto estis aventuristo de la kolonia urbo Sankt-Paŭlo, kiu iris al la landinterno de la tiama Brazilo por sklavigi indianojn kaj serĉi multekostajn ŝtonojn dum tiuj ekspedicioj nomataj bandejoj (bandeira: flago). Unu el ili restis tiom da tempo kun sia grupo, ke unu el liaj filoj ribeliĝis: la patro lin pendumigis...

Iŝmael fariĝis denove korespondanto, sed lia homeco akompanas min dum mia tuta vivo kun instigo al la verda laboro.

En Kuritibo, mia vivo estis malfacila: nenia novaĵo, ĉar ĉiu komenco estas atenco al la sorto, kiun jen ni trafas, jen ni maltrafas... Kaj dum kelkaj monatoj loĝis kun ni Gersi Alfredo Bays en egala malfacila situacio: provi la sorton... Kiam li vidis la nian, li decidis reveni al sia naskiĝa Ŝtato. Kaj unu matenon ni strangumis, ke li ne venas al la kafo de la mateno. Pli malfrue, ni ektimis kaj iris al lia ĉambro: malplena, krom per letereto. Li kaj mi ekde la seminaria epoko estas ĝemelaj animoj: ĉu estas mirinde, ke unu el liaj filoj nomiĝas Geraldo?! Iel kaj iele, nia interanimeco similas al tiu de Kalocsay kaj Waringhien, kaj do miaj legantoj povas nun imagi mian kontentecon, kiam li fine eniris en la Akademion de Esperanto, la kvina brazilano. Latria estis Sylla Chaves, poeto kaj verkinto de gravaj libroj por la instruo de Esperanto, kaj la kvara estis nia karmemora amiko Leopoldo Henrique Knoedt, al kiu ni ŝuldas la tradukon de *La Luzidoj*, epika poemo de Kamoenso, unu el la majstroverkoj de la portugala literaturo kaj de la monda. Li omaĝis min (Leopoldo, ne Kamoenso) per la peto de prezento de la originala verko kaj de ties traduko, por kiu mi tradukis du el liaj sonetoj (de Kamoenso, ne de Leopoldo), krom klarigo pri la cirkonstancoj kaj la enhavo de la Kamoensa epopeo (Kamoensa, nur por eviti la ripeton ĉe uzata posesivo: de Kamoenso, ne de Leopoldo).

La transloĝiĝo perdis al mi unu jaron de mia kurso pri Latinidaj Lingvoj en la Universitato de Brazilo, kaj mi devis ĉion refari ĉi tie (1955-1958) en la nun Pontifika Katolika Universitato de Paranao. Kaj sekvis la epoko de la konkursoj:

1958 – Konkurso por instruo de la portugala kaj de la franca en Senac (Servo nacia de lernado komerca): unua loko.

1959 – Konkurso por instruo de la latina en la Militista Kolegio de Kuritibo: unua loko en Brazilo.

1959 – Konkurso por instruo de la franca en la Militista Kolegio de Kuritibo: kvara loko en Brazilo.

1959 – Konkurso por instruo de la portugala en la Militista Kolegio de Kuritibo: malaprobata, la sola aĉa sperto en mia tuta vivo.

1960 – Konkurso por instruo de la portugala en la Militista Kolegio de Kuritibo: aprobata.

1960 – Konkurso por instruo de la portugala en la ŝtata profesorado de Paranao: unua loko en la Ŝtato.

1965 – Konkurso en la Federacia Universitato de Paranao por la libera docenteco kaj doktoreco de la instruo de la portugala: sola kandidato. Diplomo de 1967 kun du jaroj da tirkesteco...

1977 – Konkurso por asistanto de la portugala lingvo en la Federacia Universitato de Paranao: unua loko kun la maksimuma noto.

1986 – Konkurso por titola profesoro de la portugala lingvo en la Federacia Universitato de Paranao: unua loko kun la maksimuma noto.

Mia dua ĝojo per Esperanto estis mia eniro en la Akademion de Esperanto en 1970, sekvata per miaj reelektado en 1979, en 1988, en 1997 kaj – mi esperas kaj atendas! – en 2006... Kaj *il va sans dire* pri mia plaĉo esti elektita ĝia prezidanto en 1998. [Mi estis reelektita akademiano, sed rezignis la prezdantecon.]

Mian profundan dankon al Zamĉjo pro lia Esperanto kaj lia kredo mi devas publike konfesi per persona pruvo de la valoro de tiu miraklo. Mi vidviĝis en 1983, kaj unu monaton poste mi jam amindumis, kvazaŭ nenio okazis... Kaj unu plian monaton poste atakis min astmo, tiu sama astmo, kiu mortigis mian edzinon, ĝemofara gastrito, kiu mortigis mian manĝovolon, kaj mortoveka depresio, kiu puŝis min al memmortigo... En tiuj teruraj tagoj, mi rigardadis al la du metroj da miaj portugallingvaj libroj, kaj vee ekkriis al mi mem:

- Ho mi malhonesta! Tiuj libroj estas sola trompo, tuta falsaĵo kaj vera neniaĵo...

Kaj mi poste turniĝadis al la dudek centimetroj da miaj Esperantaj libroj, kaj sentis benitan mielon flui tra miaj vejnoj:

- Ho ja! Tiuj libroj iom valoras...

Sekve de tio, mia vivofilozofio estas tre simpla. Ekzistas Dio kaj Zamĉjo. Mi penas ami ilin kaj sekvi iliajn sulkojn. Mia privata vivo tamen estas mia epopeo kaj mia tragedio. Krome, mi jam faris grandajn erarojn en mia vivo, ĉar estas preskaŭ neeble al mi nei kaj negi... Mi preferas silenti, kaj tiu silento jam multe malutilis al multaj... Kaj precipe al mi mem. Kulpas ne mi, sed la kutimo kaj la kulturo. Kaj tio estas unuj el miaj plej grandaj difektoj: ĉiam havigi al mi ĝustan senkulpigon. Kia la nun prezentata per la monda proverbo:

Kiu silentas, tiu konsentas.

Kaj mi nun parolos pri mia dua disrevigo kaj disreviĝo, kiun multaj el miaj amikoj kaj misamikoj kredas mia manio: la reguloj pri la participoj, kiuj estas tiel mavaj kaj mevaj de la realeco (duba frazo, kiun mi rektigas: la reguloj, ne la participoj), ke nur ili povas klarigi al ni, kial falsas ilian uzadon ĉiuj korifeoj de Esperanto, kun la nobla escepto de nia Zamĉjo. De Stefan Maul al William Auld, multaj ofte mistrafas la ĝustan formon de la participoj, sed ne pro ilia propra kulpo, sed pro profesoriaj proponoj de reguloj, kiuj estas simplaj, sed erarigaj!... Mi akuzis ilin, kaj mi dodevas pruvi:

William Auld, en Antauxparolo al LA SXTONA URBO. Antwerpen, FEL, 2000, p. 11:
Ecx en la diversaj romanoj pri Spartako kaj la **ribelintaj** sklavoĵoj mankas fakte tiu perspektivo.

Stefan Maul, en MONATO, p. 5, februaro 2007/2: Pro severaj kontroloj pro historio pri terorismo ni estis traktitaj kiel krimuloj arestatataj...

Unu el la evidentaj erarigoj venas de la estinta verboformo finitiva, kiu estas dusenca, sed tion Esperanto neglektas. Por apogo al tia neglektado, mi kaptas unu el la propozicioj de la nuna tekso ne sub mia plumo, sed sub mia klavo:

- En la domo de Iŝmael mi faris miajn elementajn studojn de Esperanto sub lia aminda kontrolo kaj sub la severa regado de Porto Carreiro Neto, *kiu apartenis al la grupo de la plenaj konantoj de la stilo de Zamenhof.*

La kursiva adjektiva propozicio prezentas la verboformon *apartenis*, kaj la kunteksto estas nesufiĉa por decidi, ĉu temas pri imperfekta preterito aŭ perfekta preterito. En la unua okazo, li estus unu el la grupanoj, dum mi studis sub lia rego, sed en la dua okazo, li ne plu estus unu el ili en tiu sama epoko... Esperanto povas, sed ne emas indiki tion en la propozicio, sed la portugala lingvo estas devigata tion distingi:

1. Imperfekto: ... que pertencia ao grupo [kiu estis apartenanta].
2. Perfekto: ... que pertenceu ao grupo [kiu estis aparteninta].

Kaj nun, en la fino de mia vivopriskribo, mi nutras mian esperon pri interesataj legantoj, ĉar interesitaj legantoj estas legantoj post la intereso, sekve seninteresaj legantoj: ne plu interesataj legantoj.